



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 190

Februaro 2002

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

★ ★

REDAKTORA NOTO

Ni multe dankas al Suzanna Barabás kaj Ed Harler, kiuj kontribuis la tutan enhavon de ĉi tiu numero. Bone farite! Plaĉas al mi la bonhumoriga sinteno kiu spicas la enhavon kaj kaŭzas rideton ĝis ridego. Bonvolu ĝui ĉion. Parenteze, kiom precize estas duono de sako?

Taleso [Thales] (antaŭ nia erao 624? - 548)

Taleso de Miletus estis unu el la sep grekaj saĝuloj: la unua naturfilozofo, fizikisto, astronomo kaj matematikisto. La mondo taksas lin la unua scienculo.

Laŭ rakonto, li antaŭdiris la suneklipson kiu okazis je la 28a de majo en la jaro 585 antaŭ nia erao. En tiu tago estis granda batalo, kaj la soldatoj tiom ektimis, ke ili ĉesigis la lukton.

Li estis komercisto, kaj pro tio li travojaĝis la tiam konatan kulturen mondon, de Mezopotamio ĝis Egiptio. Li multon lernis dum siaj vojaĝoj.

Laŭ legendo, li gajnis la admiron de egiptaj pastroj, ĉar li povis per simpla metodo kalkuli la alton de piramido: Li enprofundigis bastonon en la teron, kaj kiam ĝia ombro fariĝis egala kun la longo de la bastono, li mezuris la longon de la ombro de la piramido; li rezonis, ke en tiu momento la alto de la piramido devas esti egala al la longo de ties ombro*.

Taleso estis la unua en historio de matematiko kiu pruvis teoremojn. Li estis nomita „la patro de matematiko”.


Alia legendo rakontas pri Taleso, ke li faris komercon de salo, kaj liveris salsakojn sur la dorso de azenoj. Unufoje okazis, ke ili laŭiris rivereton, kaj unu el la azenoj pro la varmo rifuĝis en la akvon. Post agrable malvarmiga naĝo, la azeno rimarkis ke ĝia ŝarĝo iĝis pli malpeza. Pro tiu observado, la saĝa azeno komencis ofte enriveriĝi. Kaj Taleso, pro perdo de salo, suferis damaĝon.



Finfine Taleso elpensis strategion: Li metis sur la dorson de la baniĝema azeno sakon plenplenan de spongoj. La azeno lernis, ke nun dum banado la sako signife plipeziĝas. Pro tiu sperto la azeno ne plu enakviĝis. Tiel superruzis Taleso azenon.

Suzanna Barabás, Oradea, Rumanio

* En Rumanio la teoremo konata kiel la „teoremo de Thales” estas: „En triangulo, rekto paralela kun unu el la lateroj determinas proporciajn partojn sur la aliaj du lateroj.”



Laŭ la teoremo de Taleso: Se XYZ estas triangulo, kaj rekto PQ estas paralela al iu latero de tiu triangulo (ĉi tie paralela al YZ), lateroj XY kaj XZ estas proporcie dividitaj.

Pro tio, $XP/XY = XQ/XZ$
kaj $XP/XQ = XY/XZ$

BONHUMORIGAJ PENSOJ

Nevivantaĵoj estas en unu el tri kategorioj:

1. Tiuj, kiuj ne funkcias
2. Tiuj, kiuj rompas
3. Tiuj, kiuj perdiĝas

Nenio estas tiel simpla ke oni ne povas nekompreni.

Mi ne estas konfuzita, nur tro bona miksita.

Kritikanto estas iu, kiu scias la vojon, sed ne povas veturigi la aŭton.

Kilometroj ne estas tiel longaj kiel mejloj, tial vojaĝu laŭ kilometroj kaj ŝparu benzinon.

Demando: Kiu vorto estas neĝuste literumita en ĉiuj vortaroj?

Respondo: La vorto „neĝuste.”

Ridete la via,

Ed Harler

KRUCVORTENIGMO

1	2	3	4	5	6			7	8	9
10							11			
12						13				
	14		15		16				17	
18		19		20				21		
22	23		24				25		26	
27				28				29		
30			31				32		33	
34		35				36		37		38
39					40		41			
42				43						

(R) indikas
vortradikon

HORIZONTALE:

1. Diplomato
7. Granda ŝtono (R)
10. Katastrofo
11. Komercaĵo
12. O.D.K.
13. Cerealo (R)
14. Skeletero (R)
16. Senparaj literoj en „fotelo”
17. Konjunkcio uzata por inferenci
19. Sensorgano
21. Stanislaw ... : Pola verkisto de sciencfikcio
22. Prepozicio

24. Ekmovi la aeron
26. La unuaj literoj
27. Parto de surtera veturilo (R)
28. Sanktulbildo
30. Ĥemiaj simboloj por karbono kaj kalio
31. Grupo
32. Persona nedifinita pronomo
34. Vidi nerealan bildon
37. ...-signo (interpunkciilo)
39. Astro de nia planedaro
40. Konstelacio (R)
42. Ĥemiaj simboloj de osmio kaj oksigeno
43. Dika paperfolio

VERTIKALE:

1. Demanda pronomo
2. Leviĝo ĉe akvoebeno
3. Juglando
4. Ĥemia simbolo de stano
5. Germana virnomo
6. Interjekcio uzata telefone
7. Stativo (R)
8. Hungari-proksima urbo en Rumanio
9. Pacbirdo
11. Apartenaĵo de ventoŝipo (R)
13. Forno por ĉambro
15. T.R.B.
16. Neĝero

18. Printempa floro
20. Eksterdomiĝi
23. Papero por ĥemia esploro (R)
25. Femalo
29. Parenco
31. Faro
33. Azia lando (R)
35. Membro
36. Mallongigo de strato en pluraj lingvoj
38. Progreso
40. Duono de sako
41. Sufikso ofte uzata karesence

**Multan dankon al
Suzanna Barabás de
Oradea, Rumanio**